

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 7.3.2007

120 jaroj de Esperanto

Miroslav Malovec

Antaŭ 120 jaroj konis Esperanton nur unu sola persono en la mondo, la ĉeĥan parolis kvin milionoj kaj la anglan cent milionoj da homoj. La kondiĉoj de la tri lingvoj estis ege malsamaj, kion oni ne rajtas forgesi, se ni volas kompari la atingitajn rezultojn. Esperanto disvastiĝadis sen kapitalo, sen armiloj kaj sen politika potenco, nur per forto de sia ideo kaj per sopiro de ordinaraj homoj pri kunfratiĝo kaj interkompreniĝo. La politika potenco ofte agis kontraŭ Esperanto, klopodante ĝin sufoki. La persekutojn kontraŭ esperantistoj priskribis Ulrich Lins en la libro *Danĝera lingvo*. Tamen la premoj kutime kaŭzis pli grandan fortostreĉon de la esperantistaro, Esperanto ĉion transvivis kaj disvolvis sian kulturon kaj esprimkapablon. Nun esperantistoj estas registritaj en pli ol cent ŝtatoj de la mondo.

La nombro de esperantistoj mem eble ne estas pli granda ol antaŭ cent jaroj, sed tio multe ne gravas. Homoj venas, foriras, mortas, venas kaj foriras novaj. Ankaŭ la lingvonivelo de la unuopaj esperantistoj estas tre varia, de komencantoj ĝis majstroj. Tial la kriterio pri kvanto da Esperanto-parolantoj estas ne fidinda. Multe pli grandan progreson oni povas vidi en la Esperanto-kulturo, ĉar publikigitaj libroj ne povas el la movado forkuri tiel facile, kiel iliaj aŭtoroj. Plej fama ekzemplo estas doktoro Kazimierz Bein, nomata Kabe, kiu majstre esperantigis plurajn verkojn, precipe *La faraonon* de Boleslaw Prus, kaj poste subite forlasis la movadon. Sed liaj verkoj vivas en Esperantujo ĝis nun.

En la jaro 2006 aperis en Esperantujo pli ol ducent libroj. Kompare kun aliaj lingvoj tio estas ne multe, sed pli ol multe, se unu persono devus ĉion tralegi. Grave estas, ke aperis signifaj verkoj, kiel ekzemple italaj klasikuloj Niccolo Machiavelli, Alesandro Manzoni kaj Giovanni Verga. Tiel ni povas imagi, ke ĉiun jardekon kreskas nia literaturo je mil aŭ du mil novaj verkoj. Kaj ne temas nur pri tradukoj, sed ankaŭ pri originaloj, romanoj, rakontoj, poemoj, dramoj, fakaj verkoj. La originala literaturo nun listigas ĉirkaŭ kvincent aŭtorojn de diversaj nacioj kaj ankaŭ de diversaj kvalitoj. Pri la nuntempa Esperanta literaturo ni povas diri la samon, kion antaŭ ducent jaroj skribis Josef Jungmann pri la tiutempa ĉeĥa literaturo: „Ekzistas homoj, kiuj volas faligi la ĉeĥan lingvon asertante, ke ĝi tute ne havas literaturon, kaj male ekzistas tiuj, kiuj kalkulante verkistojn je dekoj kaj centoj volus nian literaturon meti sur la saman nivelon kun la riĉaj literaturoj de florantaj nacioj. Ambaŭ dronas en profunda eraro. La unuaj devus lerni justecon, la aliaj modeston.“ Simile pri Esperanto oni ofte opinias, ke ĝi ne havas propran literaturon. Sed tiu literaturo similas al ĉiuj junaj literaturoj, do ankaŭ al tiu en la tempo de Jungmann. Granda kvanto de literaturaĵoj

estas kaŝita en nia gazetaro. Ĝia signifo estas ne nur kultura, sed ankaŭ lingva, ĉar ĝi estas fonto de novaj vortoj kaj frazeologiaj esprimoj.

Por novaj esperantistoj kutime estas la Esperanto-libroj ne atingeblaj, kvazaŭ ili ne ekzistus, sed nun precipe malnovajn verkojn revivigas la interreto. La nuntempa Esperanto-kulturo konsistas ankaŭ el muziko, teatro kaj radio-elsendoj. La radio-elsendoj de Pola Radio estis ĉijare ĉesigitaj, sed ili plu daŭras en la interreto, kio havas avantaĝon, ke oni povas ilin tiri al sia komputilo kaj aŭskulti, kiam oni havas tempon kaj bonan humoron. Inter la du mondmilitoj aktivis en nia urbo fama Verda Stacio, kie profesiaj aktoroj kaj kantistoj prezentis al la mondo ĉeĥan kulturon. Eble ni foje povos revivigi la tradicion ĝuste per interreto. La unuaj hirundoj estas enkomputiligitaj sonregistoj de Jiří Kořínek kaj Josef Vondroušek, dank' al komputilaj kapabloj de Marek Blahuš. Estas domaĝe, ke ni simile ne registris koncertojn kaj teatraĵojn en nia klubejo. Sed se ni kapablos teknike solvi la problemon, eble la nuntempaj artistoj (Smyčka, Duda, Halířová) povus plu porti la torĉon.

Kompreneble, kiel ĉiu homa agado, havas nia movado ankaŭ multajn mankojn kaj malsukcesojn. Precipe la faka lingvaĵo, terminologio, estas subevoluinta. Ni pripensu la kialojn. Mi jam menciis, ke antaŭ 120 jaroj parolis Esperanton unu homo, dum la ĉeĥan kvin milionoj da homoj, kiuj kompreneble laboris en multaj profesioj. Sed la ĉeĥa havas ankoraŭ unu grandan avantaĝon kompare kun Esperanto: nome, ke ĝi ne volas fariĝi mondlingvo. Niaj patriotoj ne klopodis disvastigi la ĉeĥan tra la mondo, ne propagandis ĝin en la plej simpla, eĉ primitiva formo, kun minimuma vortaro, por varbi kiom eble plej multajn fremdulojn. Male, nia nacio ambiciis, ke nia lingvo egalu al la plej disvolviĝintaj lingvoj de la mondo ne per nombro da parolantoj, sed per riĉeco kaj kvalito de esprimado. Oni sisteme prilaboris terminarojn de ĉiuj fakoj sciencaj, teknikaj kaj metiaj, por verkistoj kompilis grandajn sinonimajn vortarojn, por ĝenerala klerigo de la nacio aperis multaj enciklopedioj, inter kiuj elstaras la Enciklopedia vortaro de Otto. En Esperantujo similaj tendencoj elvokas ĉiam akrajn protestojn, ke oni volas komplikigi la lingvon, ke tio malhelpas propagandadon kaj varbadon. Esperantistoj ofte opinias, ke la tasko de Esperanto ne estas peri informojn, ideojn, opiniojn kaj kulturojn inter la homoj aŭ helpi en ilia profesia laboro aŭ subteni la ŝtatojn en ilia ekonomio, sed ĉasi novajn rekrutojn por sia propra disvastiĝo. Pro tio la klopodoj riĉigi la lingvon renkontiĝas kun indiferenteco aŭ eĉ kun kontraŭstaro.

Aliflanke estas vero, ke ankaŭ en la naciaj lingvoj nur minimumo da homoj laboras aktive por sia gepatra lingvo. Ekzemple ĉeĥaj verkistoj kaj lingvistoj apenaŭ formas unu procenton de la ĉeĥa nacio, ĉar tiukaze ili devus esti cent mil personoj. Tial ni ne miru kaj ne riproĉu, ke ankaŭ inter esperantistoj nur malmultaj celkonscie laboras por disvolviĝo de la lingvo. Ni simple devas konscii pri la situacio, kalkuli kun ĝi kaj direkti nian laboron tiel, ke ĝi donu rezultojn malgraŭ tiuj malfavoraj kondiĉoj.

El ĉi tiu vidpunkto la atingitaj rezultoj de nia movado estas nek bonegaj, nek katastrofaj.

Ni ne devas forgesi esperantistajn renkontiĝojn de diversaj niveloj, ekde interklubaj kunvenoj ĝis universalaj kongresoj, kiuj fakte estas festivaloj de

Esperanto-kulturo. Alilingvaj kongresoj, ekzemple por instruistoj de la koncerna lingvo, okazas nur post kelkaj jaroj kaj la partoprenantoj ricevas ĉion senpage. Esperanto-kongresoj efektiviĝas ĉiujare, kvankam la partoprenantoj devas ĉion pagi mem. En la historio de nia movado realiĝis multaj aliaj aranĝoj, pri kiuj ni povas fieri, kvankam ili jam pasis kaj restis post ili nur mencioj en la gazetaro aŭ memstare eldonita prelegaro. Ekzemple dum la unua mondmilito esperantistoj helpis al militkaptitoj de ĉiuj landoj, kiel atestas pri tio la statistikoj en Enciklopedio de Esperanto. Memstaraj ĉapitroj povus esti Esperanto-tendaroj, Esperanto inter blinduloj kaj handikapuloj, Esperanto-ekspozicioj kaj simile. Tiuj aranĝoj havas malavantaĝon, ke ili servas en la momento de okazado kaj poste malaperas kiel vapore, restas nur rememoroj. La samo atendas ankaŭ ĉi tium mian prelegon.

Mi dankas pro via tento.